

# tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo  
*Ĉasopis Hrvatskog saveza za esperanto*

oktobro 2014 / n-ro 123



Renkontiĝo de verkistoj en Zagorje



Bjelovaraj esperantistoj al sia urbo



Zamenhof-Tago festota en Zagrebo en decembro



Nova kaj pli praktika aspekto de nia retejo [www.esperanto.hr](http://www.esperanto.hr)

Ni adiaŭis al la somero 2014 per valoraj septembraj aranĝoj. En **Zagorje**, en **Hraščina** per la subvencio de Ministerio pri kulturo kaj Akademio Literatura de Esperanto okazis de la 12-14a de septembro la 12a Renkontiĝo de verkistoj kaj tradukistoj. Pri la aranĝo ni publikigas prelegojn de **Zlatoje Martinov** pri **Miguel Gutiérrez Adúriz**, **Elizabeto Sekelj** pri la jaroj de **Tibor Sekelj** en la **Hinda Unio** kaj pri la verko **Padma, la eta dancistino**, kiu tie radikas. La verko gratulinde gajnis premion por la infanlibro de la jaro 2013 en **Bonaero** lastsomere. **Zdravko Seleš** prezentas novan verkon de **Tibor Sekelj De Patagonio ĝis Alasko** publikigitan en **Đurđevac** ĉe **Grafokom de Josip Pleadin**, kiu aktivigis por traduklaboro de tiu libro multajn tradukistojn kaj unuecigis iliajn tradukojn.

Niaj muzikartistoj **Kaja Farszky** kaj **Neven Mrzlečki** kontribuis al la programo per dankkoncertoj, ĉi jare dediĉitaj al **Blanka Pavlović-Devčić**, la mecenato kiu en somero 2014 disponigis al Kroata Esperanto-Ligo kvinmil eŭrojn por helpi pli rapide translokiĝi al la propra ejo en **Vodnikova 9**.

El impona listo de la originalaj verkoj de **Miguel Gutiérrez Adúriz** ni elektis tre etan el la kolekto de mikronoveloj **Verdaj steloj ne ekzistas** (eldonita en **Novjorko** ĉe **Mundial**). La mikronovelo estas dediĉita al **Judita Rey Hudeček**.

**Tomasz Chmielik** el **Pollando** prelegis en Renkontiĝo de verkistoj pri **Edmond Privat** kaj konigis al ni siajn tradukojn el la mirinda kaj nekonata albana literaturo.

**Mihaela Cik** intervjuis la verkiston **Miguel Gutiérrez Adúriz**. La verkisto dum sia gastado en **Kroatio** kaj **Slovenio** filmis esperantlingvajn aranĝojn kaj disponigas ilin al ni.

**Filip Cirkvenčić** informas pri sia vizito al **Azerbajĝano**, kio estas premio de la azerbajĝana ambasadejo pro lia kono de geografio de tiu lando.

Verkisto el **Hum na Sutli Božidar Brezinašćak Bagola** dediĉis poemon al la malnova domo kurio, kie okazas

dum la lastaj dekdu jaroj Renkontiĝoj de verkistoj. Jen ĝia esperantlingva versio el la plumo de **Zlatoje Martinov**.

**Bjelovar** gastigis belan aranĝon per kiu esperantistoj kontribuas al la festo de sia urbo. Pri ĝi raportas **Anto Mlinar**.

En Filozofia fakultato en **Zagrebo** novsezone studobjekto pri planlingvoj rekomenciĝis ĉe la katedro de la germana lingvo ĉe la profesoro **D-ro Velimir Piškorec**. Planlingvoj - prelegata en la germana lingvo por studentoj de germanaj studoj. Dudekkvin partoprenantoj studas en vintra semestro 2014/15. Vidu ĉe: [http://www.ffzg.unizg.hr/german/cms/index.php?option=com\\_content&task=view&id=94&Itemid=1&lang=hrvatski](http://www.ffzg.unizg.hr/german/cms/index.php?option=com_content&task=view&id=94&Itemid=1&lang=hrvatski).

**Judita Rey Hudeček** instruas Esperanton en la lernejo **Retkovec** en **Zagrebo**.

**Filip Cirkvenčić** fariĝinte studento pri geografio kaj la itala lingvo en **Universitato Zadar** organizas kurson por kolegoj-studentoj.

Kurson en Gimnazio **Đurđevac** preparas **Zdravko Seleš**.

**Dalibor Šeatović** estas plia kroato kiu ekstudas en **Universitato Adam Mickiewicz** en **Poznan** kaj raportas pri siaj spertoj.

Esperanto-Societo **Tibor Sekelj** komencis sian aŭtunan sezonon per prelego pri speleologio kun prelegintoj **Mea Bombardelli** kaj **Milivoj Uroić**.

Esperanto-Societo **Trixini** el **Hraščina** laŭ rekomendoj de eduk-instancoj el **Krapina** traktas pri rekonstruo de neceso por handikapuloj en lernejo de **Speciala hospitalo de Krapinske Toplice**.

**Kruno Puškar** el **Križevci** prelegis angle en septembro en simpozio en **Poznan** pri la temo "Oftaj kritikoj pri Esperanto: faktoj kaj eraroj".

**Davor Klobučar** ŝanĝkonstruis nian retejon [www.esperanto.hr](http://www.esperanto.hr).

Por ĉiu numero de **Tempo** ni bedaŭrinde havas informon pri



Kontrolkomitato kunsidis la 13an de septembro 2014.  
Fotis Lucija Biličić

morto: niaj membroj **Miro Jelkovic** el **Karlovac** kaj **Elfriede Koren** el **Zagrebo** ne plu estas inter ni.

Rigardu la rubrikon "Vodnikova 9". Ne plu fore estas la dato kiam nia granda kredito kiu estis 50.500 eŭroj estos repagita.

Bonan legadon!

*Spomenka Štimec*

Universala Esperanto-Asocio skribe dankis al **KEL** por la kandidatigo de **Zagrebo** por **Universala Kongreso de Esperanto** kaj anoncis ke la kongresa urbo post **Nitra** en **Slovakio** en 2016 devos esti iu ekstereŭropa urbo. Se **Kroatio** volas denove **Universalan Kongreson**, ni devos plue atendi.

## ZAMENHOF-TAGO 2014

Europa domo, **Jurišićeva 1** la 12an de decembro je la 19a horo **Zamenhof tamen pravis** Enkondukas: **Judita Rey Hudeček** Muzika programo de la ensemblo **Ezerki** Organizanto: **Kroata Esperanto-Ligo**

Kroatia ekonomia ĉambro, **Draškovićevea 45**, la 15an de decembro je la 10a horo **Programo honore al D-ro Ivo Lapenna kaj la 60-jariĝo de la rezolucio de UNESKO** Lanĉo de la libro de **D-ro Ivo Lapenna Esploro kaj dokumentado de Grafokom Đurđevac** Organizanto: **Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj**

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvar foje jare. Jaro XXXIII, numero 123 (2-2014). ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de Departamento Krapinsko-zagorska al Esperanto-Societo „Trixini“ Hraščina. Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj. Voĉlegas **Spomenka Štimec**.

**Redakcio/Uredništvo; Eldonisto/Lzdavaĉ:** Hrvatski savez za esperanto/Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11/III, HR 10000 Zagreb, Kroatio, tel. +385 (1) 4617550, [esperanto@zg.t-com.hr](mailto:esperanto@zg.t-com.hr), [www.esperanto.hr](http://www.esperanto.hr), IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

**Kontribuis:** Lucija Biličić, Božidar Brezinašćak Bagola, Roža Brletić - Višnjić, Mihaela Cik, Filip Cirkvenčić, Branko Čegec, Karlo Frližec, Miguel Gutiérrez Adúriz, Antoaneta Klobučar, Davor Klobučar, Zlatoje Martinov, Anto Mlinar, Judita Rey Hudeček, Ankica Pezdirc, Blanka Pavlović-Devčić, Berislav Rubčić, Elizabeto Sekelj, Zdravko Seleš, Ljerka Stilinović, Dalibor Šeatović, Ivan Špoljarec, Marko Štimac, Spomenka Štimec, Maja Tišljar, Zlatko Tišljar.

**Redaktoris:** Spomenka Štimec. Grafike aranĝis Ivan Špoljarec. Presis Urednik d.o.o., Zagreb

**Anonctarifo:** 1/1 paĝo 1000kn (135 eŭroj), 1/2 paĝo 500 kn (68 eŭroj), lasta titolpaĝo 2500 kn (3.28 eŭroj). **Abono** por 4 numeroj jare 60 kn. Por eksterlando 10 eŭroj. Unuopa numero enlande 15 kn, eksterlande 3 eŭroj.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Foto sur la titolpaĝo: **La pejzaĝo de Zagorje**. Fotis **Ivan Špoljarec - Štef**.

# Renkontiĝo de verkistoj kaj tradukistoj en Zagorje

La 12an fojon okazis en Zagorje la Renkontiĝo de verkistoj kaj tradukistoj, la 3-taga literatura aranĝo dum kiu verkistoj kaj tradukistoj renkontas sian publikon. La aranĝon finance subtenas Ministerio pri kulturo. Dum la unua tago la verkistoj diskutas inter si kaj la lastan tagon KEL organizas por ili ekskursojn. La ĉi-jara ekskurso gvidis al **Varaĝdin** kaj helpis ĝin organizi **Stanko Rukelj**.

La publika tago okazis la 13-an de septembro en Hraščina, eta vilaĝo norde de kroata ĉefurbo Zagrebo, kien alveturis la gastantaj verkistoj kaj la publiko. La programon organizis Kroata Esperanto-Ligo kaj Esperanto-Societo **Trixini** el **Hraščina**. La ĉi-jara renkontiĝo estis la plej granda laŭ la nombro de partoprenantoj: alvenis okdeko da homoj el **Pollando**, **Hispanio**, **Slovenio**, **Serbio**, **Litovio** kaj **Kroatio**. La ĉefgasto estis unu el la kvar bardoj de la literatura ibera skolo: **Miguel Gutiérrez Adúriz** (artista nomo: **Liven Dek**). Li parolis pri sia verkaro, pri la ibera skolo kaj aparte pri siaj lastaj verkoj. Tio estis la unua renkontiĝo kun verkisto el tiu regiono kaj ĉiuj tre ĝuis ĝin. Pri lia verkaro parolis **Zlatoje Martinov** kiu atente, faklitterature pristudis la verkaron de **Liven Dek**. Krome prezentiĝis interesa projekto entreprenita de **Grafokom** el Đurđevac: eldono de la manuskriptoj de **Tibor Sekelj** sub la nomo **De Patagonio ĝis Alasko**. Necesis unue elekti la tekstojn, kiuj estis verkitaj en la serba, kaj tiam esperantigi ilin, kion faris dudeko da tradukistoj, fine ĉion unuigi, redakti kaj eldoni. Pri tiu eldona projekto rakontis **Zdravko Seleš**. **Elizabeto Sekelj** rakontis pri la hinduniaj jaroj de **Tibor Sekelj** el kiuj li tiris inspiron por la verko **Padma, la eta dancistino**. Al tiu libro de **Sekelj** estis atribuita la premio Infanlibro de la

jaro en **Bonaero**, la urbo en kiu la aŭtoro pasigis grandan parton de sia vivo. Poste prezentiĝis la pola tradukisto **Tomasz Chmielik** kiu lastateme multe okupiĝas pri la albana literaturo kaj sub lia stimulo kaj kun helpo de albanaj esperantistoj aperis pluraj libroj de albanaj aŭtoroj. Krome li okupiĝas pri studo de la tuta franclingva verkaro de **Edmond Privat**, kio estas enorma kaj ege grava laboro kiu klarigas multegajn aspektojn de la vivo de tiu esperanta pioniro. **Chmielik** prezentis ankaŭ parton el sia granda laboro pri la juda kulturo per prezento de la unika libro kun kompaktdisko **La hejmon havis mi de Mordeĥaj Gebirtig**.

**Judita Rey Hudeček** prezentis novan porinfanan libreton el Kroatio **Heliko Slavek en la kampo de sunfloroj**, kies autorino **Sonja Zubović** ĉeestis kaj mem iom parolis pri la libro.

Enkonduke en la aranĝon okazis plaĉa koncerto kun partopreno de la perkutistino **Kaja Farszky** kaj la operkantisto **Neven Mrzlečki**.

La publiko havis okazon aŭdi multajn literaturajn fragmentojn kiujn prezentis **Đivo Pulitika**.

Ne estu pretervidita ankaŭ la bonega regalado kiun la organizantoj preparis kaj kies plenumantino kiel kutime estis **Jadranka Farszky**.

Flegi originalan Esperanto-literaturon estas grava tasko de esperantistoj, sed ne multaj Esperantomovadoj tion serioze prizorgas. Tial dankon al KEL kaj Spomenka kiuj jam longatempe zorgas pri tio kaj pene serĉas (kaj trovas) financojn por tio.

*Zlatko Tišljar*

*Fotis Ivan Špoljarec - Štef*





Estro de Departamento Krapinsko-Zagorska **Željko Kolar** vizitis la majan aranĝon de KEL pri la Meteorito en Hraščina kaj parolis al la publiko la 24an de majo 2014. Fotis Karlo Frljužec.

Božidar Brezinščak Bagola

## KURIO<sup>1</sup>

Plena da rememoroj  
al tempo pasinta apartenanta  
sur deklivo sen vinberejoj...

En ĝiaj ejoj  
ĉio per antikveco eĥas:  
kuirforno masonita,  
ceramikaj bakpladoj,  
librobretoj por maldormi longe  
kaj litoj intarsitaj.

Ĉe la pordo de l' kurio  
ĉarma rideto de l' dommastrino  
kiu per peza ŝlosilo dekstramane  
anoncas kelo-malŝloson  
kaj liberigon de l' adultparo

kies amo estas neforgesebla.

*Esperantigis Zlatoje Martinov*

<sup>1</sup> En la kroata: kurija – palac(et)o de la nobeluloj. Laŭ PIV, la vorto **kurio** povas esti uzata i.a. ankaŭ kiel sid- kaj loĝloko de episkopo. (NDLT)

## BONA RILATO INTER LA PENSMANIERO KAJ LA LINGVAJ SOLVOJ

**Liven Dek** (vera nomo **Miguel Gutiérrez Adúriz**) estas poeto, prozisto kaj tradukisto kun tre vastaj interesiĝoj. Li verkas mallongan formon same en la prozo kaj en la poezio. Liaj poemoj similas al aforismoj, al hajkoj (li havas kelkajn laŭforme verajn hajkojn), liaj noveloj foje estas tiom kurtaj ke ili similas al zen-formo. Liven Dek eldonas kaj redaktas sciencfikcian revuon SFEROJ, al kiu li ofte verke kontribuas. Gravus ankaŭ menciigi ke li apartenas al la tiel nomata **Iberia Kvaropo**, (kune kun **Gonçalo Neves**, **Georgo Kamaço**, kaj **Miguel Fernandez**). La Iberia Kvaropo prezentigis per unu poemkolketo sub indikoplena titolo „Ibere Libere“ kaj per prozkolekto „Ekstretoj“. Same estas konata lia rakontaro „Ne ekzistas verdaj steloj“ (2012). Li ankaŭ sukcese elhispanigis kaj esperanten tradukis renomatan hispanan poeton **Huan Ramon Jimenez** („Platero kaj mi“), verkis vortaron (hispana-esperanta) kaj ankaŭ lernolibron pri Esperanto.

### Poezio

Poezio, kiel konate, estas spontana elverŝo de fortaj homaj sentoj. Iu diris ke poezio estas „alfa kaj omega“, komenco kaj fino de ĉiu ekscio, ĝi estas senmorta aŭ pli bone dirite daŭranta tiel longe kiel la homa koro. Por **Liven Dek** poeziarto troviĝas je spiro kaj fajna spirito de ĉiu scio, ĝi estas esprimo de arda pasio en ĉiu kampo. Ne estas facile versi kaj verki kurte, ĉar per nur kelkaj versoj aŭ frazoj oni devas esprimi tion kion oni esprimas en dikaj romanoj. Alivorte, poeto devas ne redukti sed densigi sian penson por kontentigi la ĉefajn estetikajn postulojn. **Liven Dek** plensukcesas je tio ĉar li havas klaran poetlinion kiu estas signita per forta rilato inter la pensmaniero kaj la lingvostilaj solvoj. Tio videblas en multaj liaj poemoj.

Lian poezion teme karakterizas ĝuste pasio kaj tragiko, erotiko kaj morto, same la senco-serĉo. Kiel siatempe bone rimarkis **Mauro Nervi**, la pasio kaj la tragiko estas dominantoj de la iberia kulturo, kaj mi aldonos ke same de la mediterana kaj balkana. Homoj el la menciitaj regionoj ĝuas vivon maksimume, spiriton ĉiam ili metas antaŭ materion, kaj tio donas bonan bazon por poezio kolorigita per pasio. **Liven Dek** kaj la iberia kvaropo estas ĝiaj veraj reprezentantoj.

Sed la temojn li ofte ĉerpas el la ĉiutageco el, ni diru, malgranda teatro de la ĉiutagaj absurdoj. Ekzemple en la poemeto **Vi kaj mi** la poeto alvortas al ni simplan veron, ke amrilaton ni devas flegi kiel floron aŭ eĉ batali por ĝi per ĉiutagaj kares-sentoj, per delikateco kaj tenero, se ni volas ke ĝi daŭru:

**Vi kaj mi/kilometroj da vivo kune/Vi kaj mi sune  
laboro;/Amoro lune/kaj intere/ senpaŭza batalo  
por kunvivado.**

Post disiĝo kaj amoĉeso sekvas disreviĝo, do, sekvas la amaraj versoj:

**Kiel ajnan cigaredon mian vivon vi fumis/kaj  
purema, aŭ eble eviti incendion/ sur planke la  
stumpon vi tretis**

Ĉi-loke mi devas nepre menciigi la poemeton en kiu Dek montris la majstrecon de la mallonga formo. Temas pri poemo **Ina nud'**. Nome, ĝi estas verse trisilaba, kion oni malofte renkontas en naciaj literaturoj. Ju pli ni admiras la formon, des pli ni admiras la enhavon kaj



Fotis Marko Štimac



Kroata verkisto **Predrag Matvejević** aŭskultis prelegon de hispana verkisto **Miguel Gutiérrez Adúriz** en la biblioteko **Bogdan Ogrizović**. Fotis **Judita Rey Hudeček**

la esencon de ĝia mesaĝo. Temas pri erotika rilato inter viro kaj virino. Mi citos ĝin: **Ina nud’/vira krud’/sekxa trud’/eraro ĉe volupt’/ de la nupt’/el abrupt’/ amaro.** Nenion novan **Liven Dek** diris al ni, sed tion kion li diris, li diris je la fascina maniero!

Krom ama kaj amora, lia poezio, kiel mi antaŭe diris, estas ankaŭ poezio de la sencoserĉo. Ekzemple en la poemo **Ĉirkaŭ la tuta ĉio**

**Ĉirkau la tuta ĉio/vakuo de l’ nenio/sed ekster tio – kio?**

Same la poemo pri la morto: **Nula nul’ (Nula nul’/en angul’/revas ul’/senlimon. Estas mort’/homa sort’/premas fort’/animon.**

Ankaŭ en la poemo **Frakasas:**

**Frakasas milmikrona puĉa viruso / miloble grandan disciplinitan leŭkociton / kaj milmilione pli giganta glora homo forpasas.**

Kaj en **Ĉi sento:**

**Ĉi sento de nepra fuĝo for el mi mem/pulsas sufoke en la interna parieto de mia eno/sed forkuri, eskapi, voĉo pridemandas moke: kien?**

La poeto sugestas al ni ke tio kio okazas interne de homo, precipe la spiritaj pulsadoj kiuj ektuŝas la lim-liniojn inter la ekzisto kaj nenieco, estas la plej ekscitaj, plej provokaj kaj plej dramatikaj mirakloj de l’ Universo. Sian bazon por nekonebla kaj netuŝebla esenco de la homekzistado, la poeto esprimas per la subtilaj metaforoj kaj trafaj asocioj.

Apud la ekzisto kaj neŝanĝebla de la interna forto de homrevoj, samtempe malkaŝiĝas ĝia alia flanko: nealireblo, foro, fikcio... Ne povo realigi la revojn gvidas rekte al disfalo de la reala mondo. Tiusence la plej indika estas lia poemo **Kaj foje nepris elekti**, sed ankaŭ la aliaj.

## Prozo

Mikronoveloj, kurtaj rakontoj, „kuano<sup>1</sup> de la rakonto“, prozpoemoj, do, per ĉi tiuj esprimoj ni povas nomi la prozon de **Liven Dek**. Teme diversaj, sed tamen ili havas komunan trajton samkiel en lia poezio: amo, amoro, morto (Eros vs. Tanatos) senco-serĉo...

**Liven Dek** en la noveletoj intencas ironie mezuri la paradoksojn de la tempo en kiu ni ĉiuj vivas kaj ankaŭ ĝiajn paralelajn mondojn. Same mezuri la faktojn de la realo kaj per literaturaj iloj fiksi la spiritajn subtilojn, psikologiajn kaj antropologiajn faktojn kiuj antaŭ la leganto disvolviĝas el la dramaturgio de la triviala realo. Lia mikroprozo tre facile transiras la vojon de konkreta realeco al la fikcia mistifiko de la mondo. Lia prozo do, mi tion povas aserti, alportas siaspecan konscion pri pluraj tavoloj de la realo, pri tavoloj de la tempo, pri siaspeca

akordo, harmonio, de la aŭtoro kaj liaj literaturaj herooj. La herooj (knaboj, viroj, malfidelaj edzoj kaj edzinoj, maljunuloj) estas tute senpersonigitaj; oni vidas nur iliajn specifajn karakterizojn. Kvankam kurta, lia prozo tamen havas riĉan lingvon. Plejparto de liaj noveletoj havas neatenditan, iome ŝokan finon. Tre ofte en ili oni sentas fortan ironion. Ĝi estas amara, sed ankaŭ tre humura.

Bazita sur duoblaj dioptrioj de la senco kaj sur la mikro-dramaturgio de io abrupta, neatendita, lia prozo fariĝas sence kaj ontologie graveda, kvankam tekste kurta. Utiligante la atingajojn de la mikro-dramaturgio pri ĝuste io neatendita, la aŭtoro, per metodo „densigi realecon“, konstruas la topografion en kiu oni realon rekonas kiel fabelon. (Ne hazarde li verkas sciencfikciaĵojn!).

Jam dirite: la ĉiutageco tamen fariĝas la starta punkto de lia poetika, psikologia, antropologia, estetika, do entute literatura observo. Sed la lingvoludo, intriganta(j) temo(j), plena kontentigo de altaj estetikaj postuloj kaj lingvoriĉiĝo (per neologismoj oftaj sed bezonataj kaj ne troaj) estas ĉefaj karakterizoj de la literatura kreado de **Liven Dek**.

*Zlatoje Martinov*

<sup>1</sup> Kuano: parto de zen-filozofio konsistiganta nur unu frazon. Kuano fakte estas tiomgrade densigita penso ke oni povas per ĝi diri ĉion kion oni diras en dika romano, praktike la tutan filozofian universon. Ekzemple: **Se mi levus mian dekstran manon, kien ĝi forirus?** Ĉe **Liven Dek** mi trovis unu tipan esperantan kuan-rakonton: **Mi mortigis min por ne kabei!**


## La pordo

Vane vi serĉas la murojn. Ne ekzistas muroj. Nur unu absurda pordo meze de nenio. Kaj, trans tiu pordo, virino, por ĉiam enŝlosita.

*Liven Dek / Miguel Gutiérrez Adúriz  
El kolekto “Ne ekzistas verdaj steloj”*

*Noto: Ne ekzistas verdaj steloj estas la titolo de unu el multaj libroj de Miguel Gutiérrez Adúriz. Publikigita de Mondial en Nov-Jorko. La libro, publikigita sub lia plumnomo Liven Dek en 2012 enhavas 60 mikronovelojn. Ni prezentas unu el ili, dediĉitan al Judita Rey Hudeček.*

*Zlatoje Martinov kaj Đivo Pulitika. Fotis Davor Klobuĉar*



# Mihaela demandis Miguelon

## – Kiel vi lernis Esperanton?

– Mi lernis mem. Mi uzis la libron nomatan „Esprimoj de sentoj en Esperanto“ de **Privat**. Oni pruntis al mi tiun libron, kaj, iom post iom, mi lernis per ĝi, elprenante vortojn, frazojn, ktp.

## – Kaj poste vi iris al renkontiĝoj?

– Jes, sed pensu ke en tiu tempo, kiam mi estis juna, mi loĝis en **Hispanio** kaj en **Hispanio** estis diktaturo kaj oni ne povis vojaĝi eksterlanden. Tio estis malfacila. Tamen, mi sukcesis vojaĝi al **Fredericia** kie mi konatiĝis kun **Spomenka** kaj **Judita**. Kaj tio estis mia unua internacia kongreso.

## – Kio estis via unua verko?

– Mia unua verko? Estas malfacile diri. Mi lanĉis libroserion nomatan **Sferoj** kaj en la 3-a numero aperis du miaj noveletoj. Sed anatiue mi aperigis poemojn en diversaj revuoj.

## – Kion signifas „Ibera skolo“?

– Fakte, „Ibera skolo“ estas iu fenomeno tute aparta. Ĉar, vi scias, ke en Esperanto oni dividas la grupojn de verkistoj kiuj pli-malpli kunagadas aŭ samtempe kunagadas. Ekzemple, en la hispana oni parolas pri „generacio“, ĉar ĉiuj verkistoj apartenas al sama generacio, mi ne scias ĉu tio oni ankaŭ faras en Kroatio. Sed en Esperanto ni parolas pri skoloj. Kaj en Hispanio estis junaj homoj kaj ne tiom junaj, kiel mi aŭ Miguel Fernández, kiuj tre ŝatas literaturon, kiuj tre ŝatas kune trinki, manĝi, babili, ktp. Kaj ni fariĝis tre amikaj. El tio ni venis al konkludo, ĉar ni ĉiuj faras verkojn, kial ne fari komunajn verkojn - kaj aperis „Ibere Libere“. Poste venis la momento ke ni aperigu novelojn, ni faris komunajn verkojn por noveloj. Ni ne estas nur skolo, ni estas grupo da amikoj, esence. Kaj, laŭ ni, ĝuste tio difinas nin, ke ni estas amikoj.

## – Ĉu vi povas diri ion pri la portugalo Gonçalo Neves en la „Ibera skolo“?

– Li estas homo kiu estas iom izolita ĉar li estas en **Portugaliao** kaj, bedaŭrinde, tro multe da zorgoj kaj laboraj aferoj ne permesas al li multe vojaĝi. Kaj cetere, li estas homo kiu senĉese serĉas novaĵojn. Li estas unu homo valorega, li uzas iun Esperanton nekredible belan, suplan, mirindan. Nur ke li vivas en sia propra mondo, sed li estas bonega homo kaj granda amiko.

## – Unu via mikronovelo estas dediĉita al Judita Rey Hudeček.

– Jes, mi havas tiun kutimon dediĉi al homoj, al amikoj. Hodiaŭ mi malkovros etajn sekretojn pri **Spomenka** kaj miaj noveletoj. **Spomenka** ne scias, sed en miaj noveletoj ŝi rolas foje. Do, ne ŝi, sed tio, kion ŝi faris.

## – Ĉu vi havis multajn kontaktojn kun Kroatio per Esperanto antaŭ la jaro 2014?

– Ne, nur kun Judita. Bone, mi konis Spomenka-n, sed aparte de tio, ne.

## – Ĉu vi ŝatas Kroatian?

– Jes, mi tre ŝatas, kion mi vidis, mi tre ŝatas. Mi scias ĉar mi serĉis en Google kaj mi vidis **Dubrovnik**, **Split**. Do, la tuta **Kroatio** aspektas bonege kaj estas tre surpriza por mi ĉar **Kroatio** ne estas tiel konata en **Hispanio**. Oni pensas pri **Balkanio**, sed oni ne havas la klaran ideon kia estas la vera geografio.

## – Via novelo *Peĉa tago* eniris antologion de Esperanto-literaturo... Ĉu vere vi ŝatas ĉokoladan torton kiel la rolulo?

– Jes, multege, vi vidis ke oni tranĉis por mi du pecojn. Estas strange, **Peĉa tago** ne estas mia preferata novelo ĉar por mi ĝi estis nur literatura ekzerco. Mi volis uzi multajn esperantajn diraĵojn, kaj tio estis la celo. Mi preferas ekzemple el **Ekstremoj** **La leteron** aŭ **Marta kaj Maria** ĉar ili estas sufiĉe bone konceptitaj kaj faritaj el literatura vidpunkto. Tamen, tio kio okazis kun **Peĉa tago** estas por mi aparte interesa.

Fotis Lucija Biličić



## Nitra estas la kongresa urbo de la jaro 2016

**Slovakio** neniam gastigis Universalan Kongreson de Esperanto ekde kiam ĝi estas sendependa lando. Esperantistoj kutime kongresis en la ĉeĥa parto de la lando **Ĉeĥoslovakio**.

**Slovakio** en la lastaj jaroj elstaras per la agado de kiu plej parte ŝuldiĝas al la entuziasm kaj ideoriĉa asocio E@I. (Esperanto ĉe Interreto). Malmultaj aliaj landaj asocioj de UEA havas tiom aktivan diplomaton-esperantiston, kia estas **Jozefo Reinvert**. Inter slovakaj politikaj funkciuloj ekzistas iu kiu montris ke li havas ideon pri lingva maljusteco en EU kaj agis pri ĝi **Dušan Ĉaplovič**. Kiel altranga funkciulo de la slovakaj registaro, li gvidis en 1996 en **Bratislava** interregistaran

konferencon pri la lingvaj demandoj en EU kaj konkludojn pri la konferenco li sendis al ĉiuj registaroj de EU-landoj. El la tiama kandidata lando **Kroatio** venis al li respondo de la tiama ministrino de eksterlandaj aferoj **Kolinda Grabar-Kitarović**.

**Slovakio** transprenas la gvidadon de Eŭropa Unio la 1-an de julio 2016. En la unuaj semajnoj de la gvidado de EU, **Slovakio** volas per UK montri la modelon kiel povus funkcii la internaciaj kongresoj. Ĉu ne ni ĉiam volis ke politikistoj komprenu kiel funkcias Esperanto?

**Nitra** donu al ni ĉiuj eblecon elmontri la plej belajn flankojn de Esperanto.

S. Štimec

# Pri Padma kaj la hindiaj jaroj de Tibor Sekelj

Inter 1956 kaj 1960 **Tibor Sekelj** kelkfoje vizitis **Hindan Union** kaj restadis tie dum pluraj monatoj. Kiel kutime li kunvivis kun la popolo de la lando, amikiĝis kun ili kaj tiel havis okazon de proksime ekkoni ilian vivon.

La unuan fojon li vojaĝis al **Hinda Unio** en oktobro 1956 kiam li partoprenis la laboron de la ĝenerala konferenco de Unesco en **Nov-Delĥio**, kiel observanto de Universala Esperanto Asocio.

La sekvontan jaron **Tibor** denove vizitis **Hindan Union** kaj restis tie pli longe. La libron **Nepalo malfermas la pardonon** li verkis en **Madraso** kaj intertempe li ekinteresiĝis pri joga- filozofio kaj fariĝis jogano vivante en groto kun tri aliaj joganoj.

En decembro 1959 li alvenis al **Hinda Unio** por instrui Esperanton al la sanktulo kaj disĉiplo de **Gandhi, Vinobe Bhave**. La instruado daŭris unu monaton sed li restis ankoraŭ kvin monatojn en la lando kaj vizitadis diversajn interesaĵojn kiujn li preterlasis dum siaj antaŭaj restadoj.

Apartan libron li ne verkis pri siaj vojaĝoj tra **Hinda Unio**, sed en la libro **Mondo de travivaĵoj** oni povas legi pri liaj aventuroj en tiu ĉi lando en la ĉapitroj: **Sur praarbara tanko, Kun sanktulo tra Hindujo, La dancanta kobro, Jogano mi estis, Ĉe la sanktaj riveroj**.

„La vojaĝanto traveturinta multajn milojn da kilometroj, haltis iun tagon en la eta hinda vilaĝo **Kondapur**. Tiu vojaĝanto nomiĝis... bedaŭrinde mi ne povas rememori lian nomon. Do, ni nomu lin simple onklo **Bend**.” - Tiel komenciĝas la junulara romano **Padma la eta dancistino**, kie la onklo **Bend** karakterizas la verkiston. Li havas „bluajn okulojn, malofte renkontatajn en **Hindio**.” Kaj „Li elprenis notlibreton el la poŝo, kaj ĉion notis kion **Kumar** (la nomo de la gastiganto) rakontis. Tiel li kutimis fari ankaŭ en aliaj okazoj. Kaj kiam li troviĝis en sia ĉambro ofte oni vidis lin skribi tutajn paĝojn en sia pli granda kajero. Kiam la maljuna **Dilip** demandis lin kion li faras, li respondis: - Estas bone, ke la homoj konu unuj la aliajn, eĉ se ili loĝas milojn da kilometroj de ili. Pro tio mi notas ĉion kion mi vidas kaj kio al mi ŝajnas interesa, kaj poste eble iam oni presos tion.”

La fonto de la romano estas la spertoj kaj travivaĵoj de **Tibor** vojaĝanta en **Hinda Unio**. La tuta rakonto okazas en la sama eta vilaĝo, kie ofte okazas io pro kio la vilaĝanoj kunvenas. Foje alvenas dresisto de serpentoj, alian fojon saduo, kiu estas hinda religiulo, saĝulo kaj rakontisto. Li rakontas al la homoj malnovajn legendojn kaj klarigas hindajn religiajn kredojn. Tio estas tre grava, sciante ke la plejmulto de la loĝantaro en la vilaĝo estas analfabetoj. El tiu ĉi junulara romano ni ekscias kiel festas la hinduoj la komencon de printempo, aŭ ni povas legi pri la popolaj moroj dum geedziĝa festo. Sed ni ricevas informojn ankaŭ pri tio kiel oni vestas sin, kiel loĝas, kion manĝas kaj tiel plu.

La ĉefrolantino **Padma** estas dekjara knabino. Ŝi estas filino de la dommastroj ĉe kiuj la onklo **Bend** loĝas kaj fariĝas amikino de la gasto. Ili havas plurajn

komunajn interesajn kaj ekscitajn travivaĵojn. La knabino multon lernas de la onklo **Bend** kiu proponis al ŝiaj gepatroj enskribi ŝin en la lernejon, ke **Padma** estu la unua skribokapabla knabino en la vilaĝo.

Ni komparu ŝin kun **Kumeŭaŭa**, la heroo de alia junulara romano de **Tibor**. **Kumeŭaŭa** estas dekdu jara knabo kiu vivas en la praarbaro. Laŭ sia jaraĝo li ankaŭ estas infano. Tamen li jam ĉion scias, kion li devas scii por vivteni sin en la ĝangalo. Li ankaŭ fariĝis proksima amiko de **Njikuĉap**, la vojaĝanto kiu en tiu romano enpersonigas la verkiston. Sed tie **Njikuĉap** lernas de **Kumeŭaŭa** kaj malgraŭ tio, ke **Tibor** ĉiam instigis infanojn al lernado, ke ili estu kleraj homoj, al li **Tibor** ne proponas viziti lernejon ĉar lia kono estas sufiĉa en lia medio.

En tiu ĉi romano malgraŭ tio, ke **Padma** estas saĝa, talenta knabino, sen la onklo **Bend** ŝi restus en la vilaĝo kaj neniam ellernus batali por atingi sian revon, por esti dancistino. Ni ja scias, ke en **Hinda Unio** la danco estas arto, kaj **Padma** kiu havas talenton por muziko kaj danco helpe de la onklo **Bend** sukcesas foriri el la vilaĝo por studi dancadon en **Nov-Delĥio**. Li instruis al la knabino ankaŭ venki la timon kaj la antaŭjuĝojn.

**Tibor** verkis la libron en la sepdekaj jaroj paralele en la lingvoj serbokroata kaj en Esperanto. Ĝi estis eldonita unue en **Osijek** en 1977 en la serbokroata lingvo. Poste en 1986 li reverkis la romanon. Pri tio li skribas en sia letero la 21-an de aprilo 1986: „Nuntempe mi planas reverki en pli bona formo mian junularan libron **Padma**, en kiu temas pri knabino el **Hindujo**, por ke ĝi estu almenaŭ tiel bona kiel **Kumeŭaŭa**.” Malgraŭ tio, ke jam ekzistis la plibonigita manuskripto, la slovena eldono en 1988 estis tradukita el la malnova serbokroata libro. La reverkita, plibonigita varianto aperis post dudeksep jaroj pasintjare la unuan fojon en Esperanto.

Ĉu ĝi estos tiel sukcesa kiel estis **Kumeŭaŭa**? Tion neniuj povus antaŭdiri. Sed ĝi jam estas premiita. Ĉijare en **Bonaero** dum la solena fermo de la 99-a Universala Kongreso kiel kutime estis anoncitaj la rezultoj de la belartaj konkursoj de UEA kaj la premio **Infanlibro de la jaro 2013** estis atribuita al la eldonejo Grafokom el **Durdevac** por **Padma, la eta dancistino**.

*Elizabeto Sekelj*



# Tibor Sekelj denove inter ni

Dum la lastaj du jaroj en mia malgranda ĉurdevac aperis du novaj libroj de Tibor Sekelj. Unue **Padma, la eta dancistino**, porinfana rakonto kun la temaro pri **Hindujo**, kiu ĉi-jare ĉe Beletraj konkursoj de UEA ekestis Infanlibro de la jaro, kaj due, ĉi-jare, **De Patagonio ĝis Alasko**, la libro en kiu temas pri **Ameriko** – ĝiaj historio, kulturoj de Aztekoj, Inkaoj, Majaaj kaj multaj aliaj popoloj kaj triboj de sudo ĝis nordo de **Ameriko**, pri ĝiaj naturo kaj nuntempo. Ambaŭ librojn eldonis la firmao **Grafokom** de **Josip Pleadin**, kunlaborante kun **Elizabeto Sekelj**. La dua libro estas preparita kiel ampleksa tradukprojekto, en kiu kunlaboris 25 tradukintoj (**Mila Bečka, Mihaela Cik, ĉorĉe Dragojlović, Franjo Forjan, Davor Grgat, Grozdana Grubišić-Popović, Dimitrije Janičić, Marija Jerković, Tereza Kapista, Ivan Kujundžić, Nenad Margetić, Zlatoje Martinov, Zdravka Metz, Radenko Milošević, Emilija Obradović, Radojica Petrović, Josip Pleadin, Nada Pleadin, Zdenka Polašek, ĉivo Pulitika, Berislav Rubčić, Stanko Rukelj, Zdravko Seleš, Ljerka Stilinović kaj Ivica Šćepanović Truto**), kies tradukojn provlegis **Tomasz Chmielik** kaj **Elizabeto Sekelj** kaj la libron redaktis **Josip Pleadin**. Krom traduki kaj samniveligi la tradukojn, oni devis egaligi esperantigon de personaj kaj geografiaj nomoj kaj de ceteraj specifajoj.

La du libroj plene revivigas la spiriton, la idearon kaj la mondrigardon de **Tibor Sekelj**; en ili videblas lia intereso pri ĉiuj trezoroj de nia mondo – naturaj kaj kulturaj, liaj scivolemo kaj agemo, lia homaranismo (videbla en lia vivstilo, en la amo al la homaro kaj en lia humanismo) kaj la stilo de lia verkado – edukanta pri homamo kaj optimismo. La elementoj de edukado pri homamo pli klare videblas en la porinfana romaneto, kaj en la priamerika libro la publicisto **Sekelj** vekas ĉe la leganto intereson pri la riĉaĵoj de la „Nova kontinento“, kiuj ankaŭ la aŭtoron mem allogis dum kelkdeko da jaroj, pri kio li atestas en la frazo: *“La materialon por ĉi tiu „impreslibro“ mi kolektadis dum kvin vojaĝoj, ene de 45 jaroj, inter 1939 kaj 1984.”*

La libro **De Patagonio ĝis Alasko** estas tre kompleksa. La intereso de **Sekelj** estas geografio, etnologio, antropologio, historio, do la kulturoj de Aztekoj, Inkaoj, Majaaj kaj aliaj popoloj kaj triboj de la **Suda kaj Norda Amerikoj**, kaj „nuntempo, ĝiaj pejzaĝoj kaj homoj“, tiel ke el la aro da faktoj, scioj, impresoj kaj travivaĵoj oni ne povas elekti kelkajn ekzemplojn por prezenti la libron ĝustamaniere kaj trafe. Jes, oni povas esti pli impresita de iuj travivaĵoj aŭ ekkonoj. Unu kiu min tre impresis ĉi-foje estas pri **Generalo Rondon, la amiko de Indianoj**, en kiu **Sekelj**

rakontas pri la eksterordinara persono de esploristo kaj granda humanisto, kiu *“dum la tuta vivo (...) sentis, ke ne sufiĉas nur ekkonadi la indiĝenajn tribojn kaj amikiĝi kun ili, sed estus necese ankaŭ ion fari por plibonigo de iliaj vivo kaj statuso en la brazila komunajo de popoloj.”* Invitita de la ŝtata registaro, li fondis “Servon por protektado de Indianoj”, institucion kiu zorgos pri bono de la indiĝenoj. *“La kunlaborantoj (...) penetradas en la tribojn nearmitaj. Ilia devizo estas: “Morti se necese, sed mortigi neniam!” Multaj pereis kiel viktimoj de tiu devizo.”* Post ĉi tiu frazo **Sekelj** rakontas unu tian, la plej konatan, tragikan epizodon kun doktoro **Pimentel Barbosa** kaj liaj ses kamaradoj, kiuj provis amikiĝi kun la batalema tribo de Ŝavantoj, sed *“restis sur la bordo de Rivero de Morto nur sep kadavroj terure masakritaj (...) La kuraĝa teamo pereis kun manoj plenaj de donacoj, kaj kun la vorto “amiko” sur la lipoj.”* Sed, por mi tie ne estas la kulmino de la teksto. Jen la frazoj kiuj estas krome fascinaj: *“Nu, tiu evento ne senkuraĝigis la kunlaborantojn de Rondon. Ekspedicioj plue okazadis. Ankaŭ mi partoprenis unu el ili.”* Jes, la tria frazo post ironiaj mortaj manoj *“plenaj de donacoj”* parolas pri la aventurema kaj kuraĝa **Tibor Sekelj**, kiu neniam estas nura publicisto, iu rigardanta deflanke, sed la homo kiu vivas plenpulme, heroeca kiel personoj de **Hemingway**, raraj herojoj de la moderna literaturo.

El mia persona sperto mi povas diri, ke dum jardekoj mi memoras la streĉan rakonton pri la eniro en la subteran riveron en **Meksikio**, samkiel mi ĉiam menciadis, ke en Amazonio ekzistas **Rio Tibor**. Partopreni en ĉi tiu projekto por mi estis tre interese. Kelkajn el la vojaĝimpresoj aperintaj en ĉi tiu libro mi legis knabaĝe, jam antaŭ miaj mezlernejaj jaroj, kiam en Esperanto mi legis kun granda intereso la librojn de **Tibor Sekelj** pri grandaj aventuroj tra la tuta mondo, el kiuj mi aparte memoras „Tempesto super Akonkagvo“ kaj „Nepalo malfermas la pordon“. Ĉi tiun libron mi rekomendas al la legantoj, ĉar nur tra leginte la tuton, oni povas senti la plenan ravitecon de la aŭtoro skribanta pri la „Nova kontinento“ „kun raviĝo de amanto“ kaj mem senti la samon. Tiamaniere, flufrante al ni pri siaj travivaĵoj kaj impresoj, **Sekelj** plenumas sian celon, kiun li difinis en la lasta frazo de sia antaŭparolo: *“Mia celo estas nur veki ĉe vi pluan intereson pri la beleco de Ameriko, kaj pri la beleco de nia terglobo.”* Per la du novaperintaj libroj, estas revivigita la spirito de liaj ideoj kaj klopodoj kaj ni sentas, ke tiel, spirite, Tibor Sekelj estas denove inter ni.

Zdravko Seleš



Parto de la teamo de kunlaborantoj por la libro **De Patagonio ĝis Alasko**. De maldekstre **T. Chmielik, G. Grubišić-Popović, ĉ. Pulitika, E. Sekelj, J. Pleadin, Z. Martinov, Lj. Stilinović, S. Rukelj, Staras Z. Seleš, Fotis Davor Klobučar**



# Junulara projekto

## Junulara projekto: Kiel organizi internaciajn aranĝojn?

Dum la aŭtuno plue daŭris la projekto pri kapabligo de gejunuloj por organizado de internaciaj aranĝoj. La projekton financis Urbo **Zagrebo**. Ni publikigas kelkajn raportojn de gejunuloj.

### MIHAELA CIK

Mi organizis alvenon de grupo da junaj esperantistoj el Zagrebo, membroj de Studenta Esperanto-Klubo al Renkontiĝo de verkistoj en **Hraščina**. Tie ni unue partoprenis la paroligan kurson kiun gvidis **Zlatko Tišljar**. Ni parolis pri kongresaj impresoj el **Rijeka** kaj pri eblecoj por estontaj projektoj. Ni lernis kiel krei projektojn por EU. Poste mi laboris kiel kelnerino kaj helpis en la kuirejo lavi telerojn kaj glasojn. Kune kun **Lucija** mi intervjuis **Miguel Gutiérrez Adúriz**, la ĉefan gaston de ĉi-jara Renkontiĝo de verkistoj. Mi ankaŭ ĉeestis en posttagmeza kultura programo.

Mi preparis enketilojn por evuloado de la projekto. Poste mi okupiĝis pri kreado de la grupo por la porkomencanta kurso. Mi eklegis la **Taglibron de mia frato** pri la knabo **Petro Ginz** por analizi ĉu tiu verko taŭgus por krei teatraĵon pri la temo holokaŭsto.

### FILIP CIRKVENČIĆ

Mi revenis el Azerbajĝano kaj havis la manojn plenajn de laboro. Mi organizis tri knabinojn, por ke ili lernu Esperanton dum Renkontiĝo de verkistoj en Hraščina. Kiam mi instruis en komencanta kurso, **Miguel Gutiérrez Adúriz** helpis al mi per gitaro kaj tio estis mia unika instruista sperto. Mi devis rifuzi la inviton tagmanĝi kun **Miguel** en **Varaĝdin** dum la ekskurso-tago ĉar la rivereto **Trnava** apud mia loĝloko **Mala Subotica** en **Medimurje** ege pleniĝis per akvo kaj minacis inundi. Estis terure. Ni ĉiuj helpis, portis sablosakojn, fikskonstruis la digon kaj savis la lokon. Tiel mi maltrafis tagmanĝon en la restoracio **Santa Maria** kaj informojn de nia gasto ke **Kristoforo Kolombo** sur la samnoma ŝipo havis mastojn el la ligno de la regiono, kie loĝas **Miguel**.

Tiam mi devis translokiĝi al mia nova urbo **Zadar**, kie mi ekstudis geografion kaj la italan lingvon. Mia nova vivo komenciĝis. Mi estas entuziasma riĉigi la urbon Zadar per nova kurso de Esperanto por komencantoj. Se mi sukcesos, vi legos.

### ANDREA HORVAT

Dum Renkontiĝo de verkistoj mi laboris en kuirejo. Sen tia laboro ne sukcesus iu ajn aranĝo. Homoj volas manĝi kaj kafumi, ne nur aŭskulti literaturajn prelegojn. En freŝa aero ĉiuj havas bonan apetiton. Iuj eĉ tre bonan.

Poste la 11an de oktobro mi laboris kun **Filip** en la oficejo de Kroata Esperanto-Ligo. Ni okupiĝis pri la aktujo Konteltiroj 2014 kaj enmetis dokumentojn, fakturojn apud la konteltiroj. Multe da papera laboro estas post ĉiu aranĝo.

### FILIP ŜEATOVIĆ

Mi estas parto de la teknika teamo. En la renkontiĝo de verkistoj ne estis multa teknika bezono. Mankis stativo por **Miguel** kaj mi kaj **Filip M.** kuris al la vilaĝo por porti ĝin. Ni devis malfermi la aŭton de **Pajo** kaj trovi stativon. Ni nomis ĝin tripedo. Miguel filmis la tutan programon kaj metis ĉion al YouTube. Ĉu vi vidis tion?

Dum sabata ekzerco mi havis specialan taskon analizi kostojn de la novjara aranĝo en **Weisswasser**: kotizo, manĝo, tranoktado, sume, sen veturkostoj, necesus 250 eŭroj por tie ĝui. La loko proksimas al **Dresden** kaj estas vere malproksima kaj multekosta.

### FILIP MIKULIČIĆ

Mi veturis per trajno kun miaj geamikoj al **Hraščina**. Mi ne ofte veturas per trajno. Mi portis monon de mia patro por KEL. Tio estas lia helpo al la asocio.

Teknikistoj ne havis grandajn taskojn dum Renkontiĝo de verkistoj: mi kuris kun **Filip Š.** al la vilaĝo por trovi la tripedan ilon, kiun Miguel bezonis por sia filmilo. Se ne estus la tripeda ilo, la filmoj havus pli da problemoj.

En sabato mi laboris en la oficejo de KEL. La oficeja laboro ne estas interesa: oni devas ordigi paperojn. Mi informiĝis pri la vivo de la ĉeĥa knabo **Petro Ginz**. Mi parolis al mia patro pri tiu libro en Esperanto kaj li trovis la libron en sia biblioteko kaj pruntedonis ĝin por nia kurso.

### LUCIJA BILIČIĆ

Mi veturis per trajno al Hraščina por partopreni en la Renkontiĝo de verkistoj kaj tradukistoj. Mi portis mian fotilon kaj fotis kelkajn fotojn por Tempo. Ĉu ili plaĉas al vi? Mi estis helpanto de Mihaela kiam ŝi intervjuis Miguel. Ĉiu programo kaj projekto bezonas fotiston. Sed oni forgesis foti min. Mi aŭskultis koncertan kaj literaturan programojn. Kun Mihaela mi okupiĝis pri evaluado de nia projekto.

Pro miaj studoj kaj pro mia hobbio dancado mi ankoraŭ ne havis tempon labori en la oficejo de KEL pri administra laboro.

### DIVO PULITIKA

Mi havis la taskon legi literaturajn fragmentojn dum Renkontiĝo de verkistoj en **Hraščina**. Mi devis prepari kaj antaŭ la aranĝo legi multajn tekstojn. Ĉiu kultura programo bezonas iun leganton kiu voĉe kontribuos al la aranĝo. La aktorino **Vida Jerman** multe mankas al kroataj esperantistoj. Mi ne estas aktoro, mi ŝatas literaturon.

Mi ricevis taskon, kiam mi oktobre estos en **Dubrovnik**, viziti novan esperantiston tie, **Ivan Rašić** kaj dividi kun li novaĵojn ĉar li estas izolita.

### TESA JURISIĆ

Estis plezure veturi per trajno kun geamikoj al **Zagorje**, ĉar mi malofte veturas per trajno. El Zagrebo ni ekveturis frue – je la sepa matene. **Bieno Njeguš** tre plaĉis al mi. La programo estis tre diversa. Al mi speciale plaĉis la muzikado de **Kaja Farszky**. Mi ne havis specialan taskon, sed mi gojas ĉar mi povis helpi en la kuirejo. Sinjorino **Jadranka** preparis tre bongustan manĝon. Ni ĉiuj ĝojis pri ĉio.

Mi esperas ke mi ofte povos viziti la bienon Njeguš.



Mihaela Cik

Fotis Lucija Biličić



Filip Cirkvenčić

Fotis Lucija Biličić



Andrea Horvat

Fotis Lucija Biličić



Filip Mikuličić

Fotis Lucija Biličić



Divo Pulitika

Fotis Berislav Rubčić



La publiko en la biblioteko „P. Preradović“. Fotis Ankica Pezdirc

Pri la renkontiĝo sub la nomo **Esperantistoj de Bjelovar** al sia urbo organizita kadre de la celebrado de la Tago de la urbo Bjelovar, mi skribis pasintjare („Tempo“, 119/2013). Jen ĉi-jare (ĉu jam tradicie?) bjelovaraj esperantistoj helpe de **Josip Pleadin** el **Ďurđevac** denove tre sperte kaj sukcese organizis similan renkontiĝon kiu daŭris eĉ tri tagojn (20-22 septembro). Kvankam, partopreninte nur la plej gravan parton kiu okazis dimanĉon, la 21-an de septembro, mi ĝin denove taksas tre bona: riĉa, ampleksa kaj interesa, eĉ pli bona ol la pasintjara. Tial mia demandsigna antaŭsento: ĉu jam tradicia?

La dimanĉan renkontiĝon partoprenis ĉirkaŭ cent esperantistoj kaj kelkaj bjelovaraj urbaj oficialuloj. Esperantistoj venis el diversaj kroataj regionoj kaj el najbaraj landoj (**Hungario**, **Serbio**) kaj ĉiuj povis ĝui tre diversspecan programon prezentitan tiutage: ekspozicion **Nekonata Hungario** en la Popola biblioteko **Petar Preradović**; prelegon de **Radenko Milošević**: „Ok jarcentoj de la kroata kaj hungara kunvivado“ kiel parto de multe pli vasta temo: „Tuŝpunktoj de la kroata kaj hungara historioj“; la tradician deklamkonkurson por lernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj organizitan kunlabore kun Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto (la programon gvidis **Marija Jerković**), kies partoprenantoj recitis originale kreitan en Esperanto kaj al Esperanto tradukitan, kroatan poezion; prezentadon de du novaj Esperantaj libroj: la vojaĝlibron **De Patagonio ĝis Alasko** de **Tibor Sekelj** kiun el la manuskripto tradukis 25 esperantistoj prezentis profesoro **Zdravko Seleš** kaj tre interesan libron **La triĝiba monto** de la sikula verkisto **Ferenc Szemler** el la rumania **Transilvanio**, kiun al Esperanto tradukis **Lenke Szasz** (ĝi priskribas eventojn en **Mošćenička Draga** en **Kroatio** tuj antaŭkomence de la Unua mondmilito kies centjariĝo de ĝia komenco estas ĉi-jare).

Kaj, fine, tiutagan renkontiĝon la partoprenantoj daŭrigis en la hotelo **Central** per plurhora amikumado kie organizantoj proklamis kaj premiis la plej bonajn deklamantojn de la deklamkonkurso. Ni denove havis la ŝancon ĝui muzikan programon de la lerneja grupo **Gajuletoj** el **Zagrebo** gvidita de la instruistino **Silvija Fostač**. La tuta aranĝo en la hotelo **Central** finiĝis per zimbazona muziko de **Andrija Maronić** el **Ďurđevac** kiu ludis hungarajn melodiojn.

Mia persona impresado estas ke ĉi-tiu renkontiĝo montris kapablon kaj sperton de la organizantoj kaj mi esperas ke ĝi fariĝos tradicia por kroataj esperantistoj kaj allogos ankaŭ multajn esperantistojn el najbaraj landoj. Ni povas danki al bjelovaraj esperantistoj kiujn grave helpis esperantistoj el **Ďurđevac** (**Josip Pleadin** kaj **Zdravko Seleš**). Multon pli pri tiu okazaĵo vi povas legi sur TTT-paĝoj de Zagreba Esperantisto.

Anto Mlinar

La 22an de septembro okazis interesa programo en Ekonomia kaj biroteknika lernejo **Bjelovar**. Pri **Tibor** parolis lia edzino **Elizabeto Sekelj** kaj **Josip Pleadin**. Profesorino **Radmila Radić-Parlov** organizis la programon honore al **Tibor**. Libroekspozicio montris iom el liaj multaj verkoj. Prof. **Kranželić** parolis pri **Tibor Sekelj** kaj profesorino **Dunja Šverko** legis lian poemon en Esperanto. **Vivo kiel aventuro** – estis la temo de la ekspozicio kiun ornamis bela afiŝo kun la foto de **Tibor**. **Nenad Margetić** filmis la eventon per kamerao.

Inter la 20-a kaj la 24-a de septembro, en **Poznań**, okazis la komenca sesio de Interlingvistikaj studoj. En tiu ĉi pola urbo, ekde la jaro 1998 tiujn studojn organizas Lingvistika Instituto de la **Universitato Adam Mickiewicz**, sub gvido de prof. dr-o **Ilona Koutny**. (<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/index.html>)

El **Kroatio** jam en **Poznań** studis **Tea Radovanović**, **Marija Jerković**, **Judita Rey Hudeček**, dum la pasintaj jaroj. Ĉi-jare, la novan trijaran studadon komencis **Dalibor Šeatović**. La studado estas postdiploma, kaj finiĝas per atestilo pri plenumitaj postdiplomaj filologiaj studoj en la tereno de interlingvistiko. Interesa fakto estas ke oni studas en Esperanto. La studoj mem pritraktas vastan kampon de ĝenerale lingvistikaj, interlingvistikaj kaj strikte esperantologiaj temoj. Do, tie oni instruas pri gravaj lingvistikaj studobjektoj kaj pri la loko de interlingvistiko kaj esperantologio tiusence. Sed ankaŭ oni instruas pri tipe esperantaj temoj, kiel ekzemple esperanta kulturo kaj literaturo. Ĉi-jare estas 26 partoprenantoj el 14 landoj.

Pri la temo, **Dalibor Šeatović** diras: Unue mi dankas al la organizantoj de la studoj kadre de la **Universitato Adam Mickiewicz**, sed ankaŭ al la subtenantoj kiuj ebligas la funkciadon de la interlingvistikaj studoj. Nome, **ESF** (**Esperantic Studies Foundation**) el **Usono**, kaj kelkaj aliaj instituciaj kaj privataj subtenantoj estas tre gravaj per sia financa helpo. El la instituciaj subtenantoj elstaras la retpaĝaro [www.edukado.net](http://www.edukado.net) kaj ties estiganto **Katalin Kováts**, kiu teknike prizorgas la studmaterialojn kaj retan komunikadon inter la profesoroj kaj studentoj. Ili ne nur subtenas la Universitaton, sed ankaŭ la studentojn kiuj venas el vere diversaj landoj, kun tre diversaj ekonomiaj cirkonstancoj. Oni povas imagi kiom kostas la flugbileto de Brazilo aŭ de Irano ĝis **Pollando**. Estas tie ankaŭ la kostoj de loĝado kaj manĝado, kaj la kotizo por la studoj mem. La gestudentoj ankaŭ multe mem investas, ne nur la monon, sed ankaŭ sian tempon kaj seriozan laboron, kaj tiusence montras sian dediĉon al la ideo. Ĉar ili kredas ke Esperanto - kaj la lingvo kaj la movado - tion meritas. Mi mem dankas pro la **ESF** stipendio, kiu kovras la studkotizon, kaj pro la subteno de unu tre afabla germana esperantistino kiu volis helpi la kandidaton el Kroatio.

Nia vojaĝo al **Poznań** komenciĝis tiel ke la kolego el **Beograd**, **Johan Derks**, la nederlandano kun la serba adreso venis per buso al **Zagreb**. Milkilometran vojaĝon ni daŭrigis per mia aŭto ĝis **Graz**, kie aliĝis la kolego el **Hungario** **Vajda Szilárd**. Tiel ni triope atingis la celon, kaj sammaniere revenis hejmen. La studa sesio daŭris inter la 20-a kaj la 24-a de septembro, kun la programo de kvar studobjektoj. Tuj poste sekvis la Interlingvistika simpozio, al kiu kontribuis per vere interesa prelego ankaŭ nia kolego el **Križevci** **Krunoslav Puškar**. Post la simpozio sekvis la renkontiĝo **ARKONES** (Artaj konfrontoj en Esperanto) kiun organizas la polaj esperantistoj. Do, kion diri - naŭ vere interesaj kaj etosoplenaj tagoj. Venontfoje, nia devo estas veni al la universitato la 31-an de januaro, restante tie dum sep tagoj, kiam ni ekzameniĝos pri la kvar studobjektoj pri kiuj ni hejme plenumos la taskojn postulataj de la profesoroj. Post la ekzamenoj, sekvas novaj studobjektoj, kaj en tiu ritmo dum venontaj tri jaroj.

Dalibor Šeatović

Dalibor  
Šeatović  
antaŭ  
sia nova  
fakultato en  
Pollando



710. Esperanto Societo Rijeka, anstataŭ floroj sur la tombo de Anja Hurčak	39,16 eŭroj
711. Jelena Lončarević	18,27 eŭroj
712. Teodora Kučinac	5,22 eŭroj
713. Memore al René Matoušek de onjo Vera Brigljević	6,52 eŭroj
714. Damir Mikuličić	13,05 eŭroj
715. Božena Perković	13,05 eŭroj
716. Željko Gubijan	5,22 eŭroj
717. Josip Brkanac	9,13 eŭroj
718. Stanko Rukelj	16,97 eŭroj
719. Blanka Pavlović Devčić	130,50 eŭroj
720. Anonima	13,05 eŭroj
721. Marija Kvakić	2,61 eŭroj
722. Emilija Obradović	9,13 eŭroj
723. Ivana Ramušćak	6,52 eŭroj
724. Olga Srkoč	9,13 eŭroj
725. Mira Kocjančić	10,00 eŭroj

Inter januaro kaj junio 2014 KEL kolektis inter siaj membroj 307.53 eŭrojn. Ekde la jaro 2003 KEL kolektis inter siaj membroj 40.001,41 eŭrojn.

Nia granda kredito de 50.500 eŭroj reduktiĝis al 3.418.75 eŭroj.

Aliaj kaj la lastaj kreditoj:

Kredito al Esperanto-Societo „Trixi“: 14.448,80 eŭroj.

Kredito al Esperanto-Societo Rijeka: 2.464,15 eŭroj.

Dankon al ĉiuj kiuj helpis al ni havi la propran Esperantejon en Zagrebo!

Nia banknumero en Raiffeisenbanka: Hrvatski savez za esperanto IBAN HR6124840081100881157.

#### Memorigo:

Kiam ni aĉetis nian ejon en Vodnikova en 2003, ni pagis por ĝi 108.000 eŭrojn. Ni devis pagi aldone imposton de 5.000 eŭroj. Sume ni pagis 113.000 eŭrojn.

Kiam ni translokiĝos al Vodnikova 9? Nun ni ankoraŭ povas uzi la ejon en Knez Mislav 11. Kiom longe? Ni ne scias. La posedanto de la ejo en Knez Mislav estas la ŝtato, kiu en 2014 ne difinis per kontrakto la limdaton de la uzo.



Jarkunveno  
2014.  
Fotis  
Berislav  
Rubčić

### HELIKO SLAVEK GASTIS EN LA BIBLIOTEKO MARIJA JURIĆ ZAGORKA

La pentristino **Marina Badurina-Cindrić** kiu ornamis la bildlibron **Heliko Slavek en la kampo de sunfloroj** de **Sonja Zubović** per gajaj desegnoj, ekspoziciis scenojn el la bildlibro en la zagreba Biblioteko **Marija Jurić Zagorka** sur Krvavi most la 11an de septembro 2014. **Judita Rey Hudeček**, tradukintino de la bildlibro en Esperanto parolis pri la esperantlingva traduko. La libron eldonis **Tekston** el Zagrebo kunlabore kun **Esperanto-Societo Trixi** el **Hrašćina**. **Zvezdana Jembrih** verkis entuziasman recenzon pri la desegnaĵoj de la bildlibro.

### ELFRIEDE KOREN (1919 -2014)

Membro de Kroata Fervoja Esperanto-Asocio **Elfriede Koren** mortis la 15an de junio 2014 en Zagrebo. Ŝi naskiĝis en **Maribor** la 15an de februaro 1919. Esperanton ŝi lernis dum ŝi oficis en Jugoslaviaj Fervojoj en 1956. Membro de fervojistaj esperantistaj asocioj. Kiel kasisto kaj bibliotekisto de Kroata Fervoja Esperanto-Asocio ŝi multe kontribuis al la agado de la asocio.

### MIROSLAV JELKOVAC (1945 – 2014)

Agronomo **Miro Jelkovic** naskiĝis la 14an de novembro 1945 en **Banatska Selnica**. Dum siaj studentaj jaroj li konatiĝis kun Esperanto en 1968 en Zagrebo, kie li aktivis en Studenta Esperanto-Klubo kies sprita, klera, klarvida kaj ironia prezidanto li dum unu mandato estis. Sian vivon li pasigis en la vilaĝo **Lipje** apud **Skakavac** ĉe **Karlovac**, en la bieno de siaj gepatroj, kie li okupiĝis pri kreskigo de pomarboj. La pacama Miro dum la milito fariĝis kroata defendanto. La dujaraj militaj travivaĵoj ŝanĝis kaj malsanigis lin je diabeto kaj perdis al li vidkapablon. Li mortis la 21an de oktobro 2014 en la hospitalo en **Karlovac** kaj estas enterigita en la vilaĝa tombejo de **Skakavac**.



Fotis Ivan Spoljarec (1981)

S. Š.

## Novaĵoj

### FILMAJ MEMOROJ PRI KROATIO

Miguel Gutiérrez Aduriz fimis plurajn prelegojn de Renkontiĝo de verkistoj kaj filmis disponigis per youtube:

<http://youtu.be/Kv6t42K9v60>  
<http://youtu.be/xPGiWFDDe0ZI>  
[http://youtu.be/faB\\_HDB\\_X\\_Y](http://youtu.be/faB_HDB_X_Y)  
[http://youtube.be/lknebxF\\_w74](http://youtube.be/lknebxF_w74)  
<http://youtu.be/KGbJk0u8F8A>  
<http://youtu.be/8yGOaHMqsD0>  
<http://youtu.be/ONkelqTbXbe>

Li vizitis en Zagrebo ankaŭ la ensemblon Ezerki kaj filmis makedonan kanton Eleno en la esperanta traduko de Dinka Šimunić (<http://youtu.be/x3vAkxHOevQ>).

### FILIP CIRKVENČIĆ EN AZERBAJĜANO

Juna esperantisto el **Međimurje**, kiu lernis Esperanton en Gimnazio de Varaždin, **Filip Cirkvenčić**, havis unikan ŝancon aŭguste dum deko da tagoj gasti en **Azerbajĝano** kun deko da junaj kolegoj el **Kroatio** kiuj same kiel li estis premiitaj de Ambasadego de **Azerbajĝano** pro la skriba eseo en kiu necesis montri la konon de la lando. **Filip** profitis la okazon por kontakti la lokan azeron, junulon-esperantiston Georgij Čerņiŝev kaj sendis al ni la foton pri la renkontiĝo en **Quafquaz Point Hotel** en **Bakuo**. Raras esperantistoj en **Bakuo**. La kontakton peris **Veronika Poór**.

F. C.



**Branko Ćeĝec**

### **virino kiu sopiris glacieron**

tuj mi sciis  
ke diablo vi estas laŭ horoskopo,  
ĉar el okuloj mi legas.  
vi skribas por analfabetoj.  
vi opinias ke neniu respondo atendas.  
dika viro  
promenigis  
paron da belaj okuloj:  
ĉu virino?  
ĉu infano?  
li dise rigardadas, fulmrapide, ĝis ostoj.  
vi korpon kovras,  
okuloj ĉion nudigas.  
kies estas via soleco,  
vi demandas dum mi brutale manĝegas  
dikan ĉokoladon  
kaj ĝemas,  
suspiras,  
tiel estas ĉiam kiam mi feliĉas!  
mi sopiras glacieron sur la tuta korpo.  
neĝo estas en andoj,  
kaj mi adoras vintron:  
el ĝia precizeco  
elsaltas miaj plej bonaj amikinoj.  
kun ili vi ne devas paroli pri soleco.  
kun ili vi nenion devas.

*Esperantigis Ivan Ŝpoljarec - Ŝtef*